# FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

77- LA HOUSSAYE-EN-BRIE FRANCE

★ Organo de FRANCA LIGO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ, filio de I.K.U.E. ★


=== ASSOCIATION CATHOLIQUE FRANCAISE POUR L'ESPERANTO ===

==========


Prezidanto : S-ro R.Cl. COLAS,- 6, rue de Mézières -75- PARIS -6-
Sekretario : S-ro Jean BARRIER,- 89, rue Salengro - 93- DRANCY-
Kasistino :: S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux, -27- LES ANDELYS.

C.C.P.- Association Catholi. Franç. pour l'Espéranto -ROUEN-23 24 93 K.



=== N°:1 Fr-;=== Abono : 4 Fr--; Kotizo : 1 Fr--;Sume = 5 Fr--

::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::::

Redaktorino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux, - 27- LES ANDELYS.

Sendu la materialon por la bulteno antaŭ la 20-a de marto, la 20-a de junio, la 20-a de septembro, la 20-a de decembro.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

--- N° 92 --- BULLETIN TRIMESTRIEL --- TRIMONATA BULTENO -----

Sankta PIO X-a, preĝu por ni.

---- Aprilo 1972 ---

==========

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx


## E N H A V O


paĝoj

2 & 3 : Bileto de la prezidanto

3 & 4 : la parabolo pri la vesto

4 & 5 : El la Biblio. -Meditado

5 & 6 : La gaja migranto-Optimismo

6 & 7 : Lingva angulo- Nia membraro.

7 & 8 : Ni preĝu kune/

8 & 9 : Protokolo de la marta komitatkunveno

9 : Kotiztabelo.

--- Suplemento : Voĉdonilo kaj rajtili/go por la kongreso. ---


ĉiuj en St-Germain-en-Laye la 29/30-an de aprilo 1972 !

Agrablaj tagoj prepariĝas... Tuj aliĝu (vidu januaran bultenon)

mmmmmmmmmmmmmmmmmmmmm

La venonta komitatkunveno okazos dum la kongreso en St-Germain-en-Laye en la kadro de la ĝenerala kunveno, la 30-an de aprilo 1972.

++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++++

# B I L E T O  D E  L A  P R E Z I D A N T O .

Nous rencontrer, nous connaitre, vivre une journée ensemble et préparer l'action à réaliser ensuite chacun dans sa propre sphère, tel est le but de notre rendez-vous de St-Germain, dont vous trouverez plus loin le rappel.

Dans la détente et l'amitié des repas pris en commun, nous trouverons l'occasion d'échanger des idées, de nous informer des expériences faites, d'aider les responsables à prendre conscience des actions à entreprendre. Mais aussi chacun trouvera l'occasion de penser à l'effort qu'il peut faire localement pour que le Mouvement vive, se développe, prouve son utilité par les services qu'il est en mesure de rendre.

Il importe aussi que l'esprit de fraternité universelle qui caractérise le Monde espérantiste se renouvelle auprés de ceux qu'une pensée et une foi commune rassemble au sein de notre Association.

Enfin, bien que, sans doute, tous concitoyens du même pays, nous nous devons de nous "dépayser", de nous retrouver pour ces heures passées ensemble en "Esperantujo", et de pratiquer, dans cette communauté d'un jour, la langue internationale dont l'utilisation est l'objectif de la fraternité mondiale dont nous voulons être les membres dynamiques.

Nous évoquerons, au cours de notre séance de travail, notre insertion personnelle ou en tant que groupe, dans les organisations diverses participant au développement de la diffusion de l'Esperanto sur tous les plans : culture, professions, loisirs ...

Nous devons nous associer à tous les efforts qui sont poursuivis autour de nous, pour le progrès des groupements espérantistes. Ceux qui ont le loisir et la capacité doivent apporter leur concours à l'enseignement de la langue, au perfectionnement de ceux qui ont commencé à la pratiquer.

Nous devons agir auprés de la presse de notre Pays, pour sortir de l'ombre, signaler tous les événements qui intéresse la vie du Mouvement.

.../...

.../...

Nous devons collaborer aux revues en Espéranto, notamment à celles où nous pouvons placer des articles de notre spécialité ou de notre compétence.

Afin d'élaborer un programme de travail, ensemble, au coude à coude, il faut que notre rencontre de St-Germain procure à tous ceux qui veulent agir l'occasion d'un pas en avant : chacun de nous compte sur votre participation.

R. CL. COLAS.

mmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmm

## LA PARABOLO PRI LA VESTO

Tiu ĉi paraboleto apartenas al la sinoptika tradicio (vidu Mt 9 : 16; Mk 2 : 21; Lk 5 : 36). Ni transskribas la tekstojn por substreki la variantojn :

MATEO : "Neniu alkudras flikaĵon el nefulita drapo sur malnovan veston, ĉar la plenigaĵo forprenas de la vesto, kaj pli malbona ŝiraĵo fariĝas".

MARKO : "Neniu alkudras flikaĵon el nefulita drapo sur malnovan veston; alie la nova plenigaĵo ion forprenas de la malnova ŝtofo, kaj pli malbona ŝiraĵo fariĝas".

LUKO : "Kaj li ankaŭ parolis al ili parabolon : Neniu ŝiras specon el nova vesto kaj alkudras ĝin sur malnovan veston; ĉar alie li ŝirus la novan, kaj ankaŭ la flikaĵo el la nova ne harmonius kun la malnova.

Ĉe la tri evangeliistoj sama estas la kunteksto. Jesuo rakontas la parabolon okaze de diskuto pri fasto kun disĉiploj de Johano kaj fariseoj. Ek de tiu aparta kaso li altigas la diskuton ĝis la esenca temo.: la noveco de la Evangelio. Ĉeestas la Regno de Dio, la mesia erao. Tial la nova Interligo nuligas la Malnovan. La dian volon sekvi estas kredi je Jesuo, la Nova Homo. Oni ne povas fari kompromison aŭ starigi sinkretismon. Ne temas nur adapti, sed anstataŭigi. Laŭ Luko precipe tre forta estas la opono. La Evangelio de Jesuo estas la nova vesto de la homaro. Ridinde kaj vane estas voli ŝiri pecon el ĝi por alkudri ĝin sur la malnovan veston, nome la judaismon. Estas la antaŭa kondamno de la judkristanismo, kiu

.../...

.../...

dividis la unuajn kristanojn. La kristana universalismo kaj ties leĝo de libereco estas neakordigeblaj kun la naciista partikularismo kaj etika religia legalismo. Kiel diris Paùlo : "la leĝo fariĝis nia pedagogo, kondukanta al Kristo, por ke ni praviĝu per Fido. Sed nun, post kiam la Fido alvenis, ni jam ne estas sub pedagogo" (...). "Por libereco Kristo nin liberigis; tial staru fortike, kaj ne reimplikiĝu en jugon de sklaveco, Jen mi, Paùlo, diras al vi, ke, se vi cirkumcidiĝos, Kristo al vi tute ne utilos" (Gal.3 : 23; 5 : 1-2).

La noveco de la kristanismo estas ĉiam skandalo, nun kiel iam, por tiuj, kiuj volus preni pecon de Kristanismo por rebonigi Ekzemple sian malnovan socian, ekonomian, politikan sistemon. Evangelion oni ne uzas, oni sin lasos per ĝi transformi, por iĝi tiu "nova homo" (Ep. 2 : 15), tiu nova kreitaĵo", pri kiu parolis Paùlo : "Se iu homo estas en Kristo, estas jam nova kreitaĵo, la malnovaĵoj forpasis, jen ili jam estiĝis novaj" (2 Co 5 : 17).

La fundamento de ĉiu novaĵo estas Kristo : "Vidu, mi feras ĉion nova" (Apok 21 : 5 ). Kaj diris sankta Ireneo : "Kristo sin mem alportante alportas ĉiun novaĵon". En tiu paska tempo, tempo de printempa renoviĝo kaj de spirita renaskiĝo, ni preĝu kun la Eklezio, por ke "purigitaj je ĉiu malnovaĵoj ni povu estiĝi novaj kreitaĵoj".

Gérard-Henry BAUDRY.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

## E L   L A   B I B L I O

(La Agoj : 7 : 51,60)

"Vi malmonukaj, vi necirkumciditaj je koro kaj oreloj, vi ĉiam rezista al la Sankta Spirito; kiel viaj patroj, tiel ankaù vi. Kiun el la profetoj viaj patroj ne persekutis ? Kaj ili mortigis tiujn, kiuj antaùmontris pri la alveno de la Justulo, de kiu vi nun fariĝis la perfidintoj kaj mortigintoj; vi, kiuj ricevis la legon, kiel anoncitan per anĝeloj, sed ĝin ne observis.

Kaj aùdante tion, ili koleriĝis el la koro, kaj grincigis kontraù li siajn dentojn. Sed li, plena de la Sankta Spirito, rigardis fikse al la ĉielo, kaj vidis la gloro de Dio, Jesuon starantan

.../...

.../...

dekstre de Dio, kaj diris : Jen mi vidas la ĉielon malfermitan kaj la Filon de homo starantan dekstre de Dio. Sed ili ekkriis per laŭta voĉo, kaj fermis siajn orelojn, kaj kuregis sur lin unuanime, kaj elpelis lin el la urbo, kaj ĵetis sur lin ŝtonojn; kaj la atestantoj demetis siajn vestojn apud la piedoj de junulo, nomata Saŭlo. Kaj ili ŝtonmortigis Stefanon, vokantan kaj dirantan : Jesuo, Sinjoro, akceptu mian spiriton. Kaj li genuiĝis, kaj ekkriis per laŭta voĉo : Sinjoro, ne metu sur ilin ĉi tiun pekon. Kaj tion dirinte, li endormiĝis.".

<u>Meditado</u> : La martiro de Stefano ripetas la Pasionon de Jesuo : samaj estas la paroloj de pardono al la turmentistoj, de rezigno en la Sinjoro. Sed dum Jesuo estis ŝarĝita de mondopeko kaj preskaŭ subpremita de ĝi, Stefano vivis sian pasionon en la Paska ĝojo. Li sciis, ke Jesuo estas vivanta, le vidis lin.

Sinjoro, meze de la vivafliktoj, kiuj elfinas vian Pasionon en mia korpo, montru al mi vian vizaĝon, por ke mi havu la kuraĝon fidi vin kaj pardoni al ĉiuj.

(El Vie Chrétienne N° 136)

§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§

LA GAJA MIGRANTO

el germana kanto
Der frohe Wandersmann

Se donas Di' al vi favoron,
Li sendas vin for el la dom',
Por montri sian mirlaboron,
La belan mondon, al la hom'.

De l' montoj riveretoj fluas,
Alaŭdoj kantas super mi,
Mi ankaŭ gajan kanton bruas
Al la tutmonda harmoni'.

Al Dio fidas mi kun ĝojo :
Li zorgas pri la tuta ter',
Li ankaŭ min sur mia vojo
Eterne gardos de Danĝer'.

L.L. Zamenhof.

---

# O P T I M I S M O .

En puto ĝardena du siteloj tute malsekaj babilis
Dum grincadis la rustiĝintaj ĉenoj.
Unu diris al la alia :
"Sciigu al mi kamarado, kiel, dum mi estas malgaja kaj malafabla, vi, kies bonhumoro estas vidinda, laboras gaje de matene ĝis vespere ?"

- Sed de kio venas via enuo ?

- De mia sensprita laboro ! Kiom ajn mi supreniras plena, estas ĉiam por malsupreniri malplena !

Ciutage mi benas mian destinon, kiom ajn mi supreniras malplena, oni suprengrimpigas min plenplena.

Ralph Waldo Trine
tradukis J. Kraemer.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

# L I N G V A A N G U L O

Post la finpreparo de la januara bulteno alvenis pliaj respondoj al la antaŭaj proponoj, nome de S-ino Michau kaj S-ro Duchez. Mi notas nur la ankoraŭ ne proponitajn :

1°/- Il est encore vert pour son âge : juneca kvankam nejuna (M) li jam ne kadukiĝas en sia aĝo (D)

2°/- Je ne peux plus m'en passer : Tio iĝis necesega por mi(M); mi ne plu povas abstini tion (D).

3°/- Fiche-moi la paix : Trankvilon mi petegas (M); sufiĉe kun vi (D).

4°/- J'en ai marre : supertedata de tio (M); mi tediĝas, mi laciĝas je tio, mi ĝissate tediĝas, al mi ĝisnaŭze pro tio (D).

5°/- UN beau petit brin de fille : sanaspekta belulino (M); beletulino, belkreskulino (D).

Por la januaraj proponoj venis tradukoj de S-ino Michau (M), S-roj Broise (B), Despiney (D), J. Guillon (G), kaj Ribot (R).

1°/- S'EPANCHER AVEC ABANDON : Tutlibera Konfidi (M); tutfide elverŝi sian koron (B); trankvile kaj fideme sin elverŝi (D); plenkonfideme paroli (G); plenfide paroli, plenfide konfesi sian opinion, emon, plezure malfermi sian koron al (R).

.../...

.../...

2°/- IL EN RESTE BABA : li mutiĝis pro mirego (M); li restis gapmiranta (B); tio lasis lin tute mirkonfuzita (D); li daŭre mirigis (G); li restis senvoĉe, li restis tiel muta kiel statuo, marboro(R)

3°/- IL ENFOURCHE SON DADA : li ekpriparolas sian preferatan temon (M); li eksaltas sur sian amatan ĉevaleton, li ekrajdas sur sia amata rajdilo (B); unu fojon pli li parolas pri sia preferinda temo (D); li karesas sian amatan ĉevaleton (G); li revenas al sia manio, li refoje iras al sia hobio (R).

Laŭdan mencion al S-ro Inĝ. Broise !

Novaj proponoj :

1) haut en couleur; 2) de fil en aiguille; 3) faire du lèche-vitrine; 4) avoir la chair de poule; 5) un bidonville; 6) tailler une bavette; 7) avoir un air sur le bout de la langue; 8) sans blague.

==========

NIA MEMBRARO :
==========

Benfarantoj 1972 : 2)- S-ro LE MARQUAND (C du N)
3)- S-ro BELIARD (L.A.)

Novaj membroj : 1)- S-ino GASPARD (Val d'Oise)
2)- F-ino GASPARD (Val d'Oise)
3)- S-ro LORILLOU (Loiret)
4)- S-ro BOURDON (Nord)
5)- S-ro BOURDEAUX (Paris)
6)- F-ino DEVERRE (Orne)
7)- S-ro LAFARGUE (L-A)

£££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££££

NI PREĜU KUNE
---

Por faciligi komunan preĝadon okaze de niaj internaciaj renkontoj, ni aperigas ĉi sube la tradukon de la anĝela saluto laŭ la libreto de S-to Wannemakers. Ni aldonas tradukproponde la bela kanto "Salve Regina", fare de nia amiko R. Despiney. Li ŝatus havi vian opinion pri tiu traduko.

SALUTON MARIA

Saluton Maria, graceplena,
La Sinjoro estas kun vi,
Benata vi estas inter la virinoj
kaj benata estas la frukto
de via sino, Jesuo.

.../...

.../...

Sankta Maria, Dipatrino,
Preĝu por ni, pekuloj,
Nun kaj en la horo de nia morto. Amen.

---

SALUTON REĜINO

Saluton Reĝino, korfavora patrino, nia vivo,
Nia konsolo kaj nia esper' , saluton.
Al vi ni krias, ekzilitaj infanoj de Eva,
Al vi ni ŝpiras, ĝemante kaj plorante en tiu larmplena valo.
O vi, nia advokatino,
Al ni turnu viajn okulojn mizerikordajn - turnu al ni -
kaj Jesuon, benitan frukton de via sino, al ni montru, post tiu ekzilo, montru al ni,
Pardonema, kaj pia, kaj milda virga Maria.

mmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmm-:-:-:-:-:-:-:-:-:-:-mmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmmm

KOMITATKUNVENO DE LA 19-a DE MARTO 1972.

---

La prezidanto malfermas la kunvenon je la 15.15 en ĉeesto de : S-roj, Barrier, Baudry, Colas, Ligot, Marmou, S-ino Vincent.

Aŭskultanto : S-ro Despiney.

Petis senkulpigon : S-ro Bessière.

-:-:-:-:-:-:-

I. PROTOKOLO DE LA ANTAUA KUNVENO

unuanime akceptita

II. KONGRESAJ AFEROJ

La konsilianoj preparas la tagordon de la ĝenerala kunveno en St-Germain-en-Laye; ĝi estos la jena :

1)- malfermo kaj bonvenigaj vortoj de la organizantoj
2)- morala raporto de la prezidanto
3)- financa raporto de la kasistino
4)- voĉdonado por renovigi 1/3 de la konsilio
5)- starigo de agadplano por la venonta jaro
6)- elekto de nia reprezntanto en Como
7)- rezolucio
8) - loko kaj dato de la venonta kongreso

La temo de la kongreso estos :"ĉeesto de la katolikaj esperantistoj en la neŭtralaj asocioj esperantistaj kaj ne esperantistaj.

/.../...

.../...

III. IKUE - KONGRESO 1974

S-ro Barrier, kiu jam komencis klopodojn ĉe Taizé, reskribos al la samideanoj el Saône-et-Loire, kiuj pretas helpi en eventuala organizo de IKUE-kongreso en tiu loko ?

IV. DIVERSAĴOJ

a) alvoko al Radio-Vatikano por ke ĝi dissendu en Esperanto.

b) nova informbroŝuro de UFE, utila por informi la neesperantistojn; la konsilio pristudas la eblecon sendi unu al ĉiu katolika universitato.

C) Esperanto en Eùropo : kio fareble por konigi nian lingvon tie ?

Post komuna preĝo "Patro nia", la prezidanto fermas la kunvenon je la 17.15.

§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§§

## KOTIZTABELO 1972

| | |
|---|---|
| IKUE kun "Espero Katolika" .............................. | 17 Fr |
| IKI kun "Vojo, Vero, Vivo " .............................. | 5 Fr |

Peranto : G. véron, P.ĉ.k. -Rouen- 11 88 63 Z.-

| | |
|---|---|
| ACFE kun "Franca Katolika Esperantisto" ................ | 5 Fr |
| infano malpli ol 16- jara .............................. | 2 Fr |
| Membro bonfaranto .............................. | 25 Fr |
| Dumviva membro .............................. | 100 Fr |
| UFE kun "Revue française" .............................. | 35 Fr |
| UEA kun "Esperanto", kaj "Jarlibro" .............................. | 50 Fr |

C.C.P.- Association Cathol. Franç. pour l'Espéranto,-ROUEN-23 24 93 K.-p.ĉ.k.-

Dépôt légal : 2° trimestre 1972
Papier de Presse N° 34.745-
Directeur-Gérant : Gaston VERON

Polycopié par F.M.C.-
Prieuré Saint-Martin
LA HOUSSAYE-EN- BRIE
77610- FONTENAY-TRESIGNY

Supplément au bulletin trimestriel " Franca Katolika Esperantisto"
N° 92 Avril 1972

ĝenerala kunveno de FKEA. Dimanĉon, la 30-an de Aprilo 1972

Voĉdonilo por la renovigado de 1/3 de la konsilio sendota antaŭ la 25-a de aprilo 1972 al nia prezidanto S-ro R.Cl. Colas, 6, rue de Mézières, =75-Paris-6- en fermita koverto, afrankita je 0,50 Fr, kun indiko "Voĉdonado FKEA". -Ne forgesu indiki sur la koverto vian nomon kaj adreson.

N.B.- Tiun koverton oni malfermos nur dum la ĝenerala kunveno. Se vi volas skribi persone al S-ro Colas, vi povos meti la fermitan koverton "Voĉdonado" kun via korespondaĵo en alian koverton, tiun ĉi sen indiko, adresitan al li.

# Voĉdonilo mankas

LISTO DE LA KANDIDATOJ

Prezentiĝas 4 kandidatoj por 4 postenoj.

S-to BAUDRY Gérard (Nord)

S-roj BESSIERE Albert ( I & V )

COLAS René-Claude (Paris)

DESPINEY Roger (Val de Marne) (nova kandidato)

REORDIGO DE LA SLIPARO

Nomo : kaj antaŭnomo :

Naskiĝdato :

Profesio :

Adreso :

Ĉu vi gvidas Esperanto-kurson ? JES NE En kiu instituto ? Kiam ?

Nombro kaj aĝo de la gelernantoj :

Bonvolu tuj resendi al la kasistino : S-ino J. Vincent, rue des Oiseaux; - 27- LES ANDELYS.-